stelo j 2

BRAZILA ESPERANTO-GAZETO SENDEPENDA

PORTO ALEGRE, NOV/1983 - FEB/1984 N-RO 2 1-A JARO



6a B E J K

en la 25a/29a de januaro, 1984 - promissão, sp

S T E L O J
brazila esperanto-gazeto
sendependa
koresp ond-adreso: Mal. Frota 278, Cristo Redentor, 90000-Porto Alegre, RS, Brazilo.
ĉef-redaktoro: Cesar Dorneles Soares (Porto AlegreRS)
kunlaboris ĉi-numere: Amélia M. Hamada (San-PàuloSP) Alexandre Pimentel (Porto Alegre, RS), Marcelo U. Ferreira, (San-Paùlo, SP), Zélia C. da Silva (Porto Alegre, RS), Ari Fialho Junior (Porto Alegre, RS), Ernani Borges (Porto Alegre, RS) k Barbara Kucharska (Pollando)
ĉiu kunlaboraĵo bonvena !
atentu! se vi volas ricevi perpoŝte la proksiman numeron de STELOJ, bv. sendi kontribuon de Kr. 90 sub la formo de poŝt-markoj rekte al la supra adreso.
"Esperanto unuigos la homaron". (Lazaro L. Zamenhof)

LETEROJ

atentokapta enhave

"jen do: STELOJ!(mi ĵus kaŝlegis ekzempleron de Amelia...).Jen do revuo: plia vojo al skriba uzode E-o zorge redaktita, atentokapta enhave - jes ja!(...)Ha, kiom gravaj estas tiaj iniciatoj!Antaŭen!" (Marcelo Urbano Ferreira, SAN-PAŬLO/SP)

laŭdinda iniciato

"Danke mi manifestas la alvenon de STELOJ dum la pasinta semajno Ĉiuj kunlaborantoj ja meritas varman komplimenton.Gratulon, estimataj junuloj kiuj redaktis STELOJ/1.Gia lingvonivelo farigis preskaŭ neriprocebla (mankis nur akuzativo: NOVA ESPERANTO-KERNO ...).Mi laŭdas vian iniciaton kaj entreprenemon.(...)Al ciuj redaktoroj mi prezentas sincerajn bondezirojn, ke via nova verda entrepreno fariĝu seninterrompa k fruktodona kunigilo ĉefe por la novbakitaj samideanoj". (George Otto Vaske, CAÍ/RS)

* ESPERANTO EN JUGOSLAVIO

• Jugoslavio: Dum la pasinta lerneja jaro, en Pirot la Internacia Lingvo estis regule instruata al 180 gelernantoj de la bazaj lernejoj en tiu urbo proksima al la landlimo inter Jugoslavio kaj Bulgario. Sur la foto estas grupeto da gelernantoj kun la plej agema kaj plej malnova loka E-aktivulo, s-ro Jovan Pavlović.

INTERVJUO

JOSÉ LUIZ FERREIRA

NIA ĈI-NUMERA INTERVJUO ESTAS KUN JOSÉ LUIZ FERREIRA, 27-JARA, ADVOKATO, BANKOFICISTO KAJ NUNTEMPA PREZIDANTO DE BEJO-BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO:

STELOJ - De kiam vi estas esperantisto?

JOSÉ LUIZ - Mi eniris la movadon en marto 1980, iom hazarde ĉefe por scii ion pri la lingvo kaj iom post iom mi fariĝis esperantisto.

STELOJ - Kion vi opinias pri la brazila E-movado?

JOSÉ LUIZ - Ne estas facile fari skizon pri la brazila Esperanto-movado.Ĝenerale ĝi marŝas malrapide sed bone.Ankoraŭ mankas kompetentaj instruistoj kaj grava unueca nacia movado.

STELOJ - Kiaj estas viaj planoj kiel BEJO-prezidanto?

JOSÉ LUIZ - Kiam ni estis elektitaj (julio 1983 en Ouro Preto-MG), ni prezentis niajn planojn kaj tiuj planoj gvidos nian konduton dum nia estrarperiodo.Ekz.: vigligi niajn kontaktojn kun TEJO, ĝiaj landoj sekcioj, neesperantistaj organizoj, en Brazilo aŭ alilande; eldoni altkvalitajn gazetojn; daŭrigi la tutamerikan kunagadon.Sed nia plej grava celo estas la brazila junularo, t.e., fari ke ĉiuj partoprenu aktive la brazilan Esperanto-movadon kaj ke ĉiuj junulgrupoj interrilatiĝu; sur tiu kampo gravas la rolo de la jam funkcianta sistemo BEJO-ĉieestanta: kunveni pli ofte kaj dise tra Brazilo.Kelkajn grupojn ni jam vizitis kaj sukcese kunsidis kun ili en ŝtato Paraná, Brasília, Recife, Belém kaj aliaj urboj en ŝtato San-Paŭlo.

STELOJ - Kiaj estas viaj spertoj kaj opinioj pri E-instruado?

JOSÉ LUIZ - Mi opinias ke la kresko de esperantistoj dependas nur de sukcesa instruado.Do ni devas zorgi pri pli ampleksa kaj celkonscia instruado de Esperanto.Mi persone preferas havi homogenan lernantaron, t.e., ĉiuj gelernantoj estu samnivelaj.Kaj mi uzas la preskaŭrektan metodon.

STELOJ - Rakontu al ni ion pri via plej emocia momento kiel esperantisto.

JOSÉ LUIZ - Paroli ej Esperanto estas kiel rakonti ĉion, kion oni sentas en ĉiu momento de l' vivo.Mi ne kredas je iu ajn emocia momento, sed ja mi povas citi kelkajn kortuŝajn momentojn, ekzemple,

(daŭrigas sur p. 5)

52 rubrikoj de Ĝavanan

EN ĴUS RICEVITA RAPORTO pri la agado en Irano dum la pasinta jaro elstaras tri tre influriĉaj atingoj.

Jam dum tuta jaro la revuo *Ĝavanan* ("Junularo" – eldonata de la plej granda irana gazetejo Ettela-at en 500 000 ekz) aperigas ĉiusemajnan rubrikon "Vivu Esperanto", ĉiufoje sur po 1-2 grandformataj paĝoj. Ĝi konsistas el: konciza leciono de Esperanto; respondoj al leteroj de legantoj pri Esperanto kaj la lecionoj; citaĵoj el la ricevitaj leteroj (meznombre 135); biografietoj de famaj personoj, kiuj parolis favore al Esperanto (Tagor, Gandhi, Tolstoj, Tito ktp); pri-Esperanta krucvortenigmo kun premioj (lernolibroj de Esperanto donacitaj de la eldonejo Atai).

Alia paĝo de *Ĝavanan* sub la rubriko "Hodiaŭa scienco" aperigadas informojn tradukitajn el la Esperanta revuaro, ekz. el *Homo kaj kosmo*, *Monato* kaj *El popola Ĉinio*. La Esperanta fonto estas emfaze indikita.

La redaktoro de "Vivu Esperanto", s-ro Reza Ĥejr-ĥah, mem lernis Esperanton en la Universitato de Tehrano. Ĉar nuntempe la universitatoj estas fermitaj, estas luita tri-etaĝa domo proksime al la Universitato, je kosto de ĉ. 3000 gld. monate, jam de julio 1981. La domo ricevis la nomon "IRAN-ESPERANTO". Multaj gejunuloj de "IRAN-ESPERANTO" kunlaboras kun s-ro Ĥejr-ĥah en la redaktado de "Vivu Esperanto". Krom en tiu domo, okazas kursoj nuntempe ankaŭ en pluraj moskeoj.

Unika kaj tre signifa kurso – ne malpli grava ol tiu por 675 geinstruistoj en 1980 – jam estis aludita en nia maja numero. Temas pri oficiala deĵortempa intensa kurso de la irana aer-armeo. Partoprenis 36 oficiroj. La kurso daŭris 480 horojn, 4 horojn tage, 5 tagojn semajne, dum 7 monatoj (1980 09 27 – 1981 05 05).

La rubriko pri Esperanto en "Ĝavanan" estas nova sperto – kaj defio al la resto de la Movado! – pri la strategio de nia informado. Irananoj mem skribas jene: "Alloga paĝo en nacilingva gazeto estas multege pli efika kaj pli ekonomia, ol la eldonado de pluraj negravaj bultenoj, cirkuleroj k.s. Feliĉe, tio ĝuste subtenas la sugeston de la UEA-prezidanto, G. Maertens, en la malferma parolado dum la 66a UK en Brazilo."

Neruda

EL LIBRO DE L' DEMANDOJ

Kial la grandegaj aviadiloj
ne promenas kun siaj idoj?

Kiom da preĝejoj havas la ĉielo?

Kio okazas al la hirundoj
alvenintaj malfrue al la lernejo?

Ĉu pacas la paco kolomba?

Ĉu militas la leopardo?

Kiel scii, kiu estas Dio
inter la dioj el Kalkuto?

Kiom da semajnoj havas tago
kaj kiom da jaroj monato?

Se finiĝos la flavo
el kio ni faros panon?

Al kiu mi povas demandi,
kion fari en ĉi-mondo?

Kial la ĉapelo de l' nokto
flugas kun tiom da truoj?



elhispanigis M.U.F, el SAN-PAŬLO

INTERVJUO/daŭrigo

kiam mi, vojaĝante en plenplena trajno tra Bolivio, mi aŭdis, de la alia flanko de la vagono, laŭtan krion en Esperanto: "kiel vi fartas". Subite mi turnis min kaj renkontis amikon, kiun de longe mi ne vidis.

STELOJ – Kelkajn personajn donitaĵojn: aĝo, profesio, naskiĝ-loko kaj aliaj kiujn vi Juĝu interesaj:

JOSÉ LUIZ – Mi naskiĝis en la urbeto Luiziânia-SP en la 22-a de majo, 1956 sed tuj poste mia familio translokiĝis al Tupã-SP dum mi iris por studo al Birigüi –

(daŭrigas sur p. 7)

ANONCETOJ

ERNANI BORGES deziras korespondi pri ĉiuj afe-roj. Curupaiti, 761, kvartalo Cristal, 90000 Porto Alegre/RS.

VANIZA CORRÊA deziras korespondi kun ĉiaaĝaj personoj pri muziko k interŝanĝi bild-kartojn. Domingos A.Santoro, 86 Porto Alegre/RS

ARI FIALHO JUNIOR deziras korespondi kun personoj de iu ajn aĝo pri poemoj kaj interŝanĝi bild-kartojn. Ivo Nicolau Antinolfi, 190, ap. 101, Parque dos Maias, 90000 Porto Alegre, RS.

CESAR DORNELES SOARES deziras korespondi pri E-instruado. Mal.Frota 278, Cristo Redentor, 90000 Porto Alegre, RS.

DIFINOJ:

BAJONETO – Taŭgas por ĉio escepte por mortigi la pensojn.

BIBLIOTEKO – Librotombejo.

DEMOKRATIO – Politika sistemo, en kiuj ĉiuj homoj estas egalrajtaj surpapere.

KILOGRAMO – milo da gramoj; por komercisto, okcent gramoj.

MALFELIĈO – venas rajde kaj foriras piede, diras la proverbo.

ŜTELISTO – Profesiulo dank' al kiu havas okupon policistoj kaj juĝistoj. (el "Populara Vortareto")

AMÉLIA M.HAMADA, el SAN-PAŬLO

BONŜANCULO Biciklisto veturanta kun granda rapideco frapfaligas preterpasanton. Li haltas kaj helpas al sia viktimo leviĝi kaj li diras: "Ho, vi estas bonŝanculo, ke mi hodiaŭ havas ferion. Labortage mi estas ŝoforo de aŭtobuso..."

BARBARA KUCHARSKA, el POLLANDO

INTERVJUO/fina parto

SP. En 1975 mi venis al ĉefurbo por studi juron. Hodiaŭ mi estas advokato kaj laboras en banko; vivadas en San-Paulo kaj revas plej baldaŭ eble loĝi en ŝtato Rio Grande do Sul.

ESPERANTO EN SVEDIO

● **Svedio:** Iom pli ol simpla "Esperantostrato" fariĝis la nove nomita *Esperantogatan* en Malmö, ĉar ĝi estas ankaŭ la finhaltejo de urba aŭtobusa linio.

ESPERANTO EN PORTO ALEGRE

46 personoj partoprenis, je la 5a de novembro, en la 2a AMIRENKO-AMIKARA RENKONTIĜO, promociita de la E-departamento de Spiritisma Societo "Allan Kardec" (Andrade Neves, 60, urbocentron). La programo konsistis el diskutado pri la temo "La lernanto en la movado: kiel partopreni?", teo-trinkado, arta prezentaĵo (teatraĵeto) kaj disdonado de atestoj al kursfinintoj. Oni proponis multajn sugestojn okaze de la pripensado pri la temo, i.a. la jenoj: diskoniga aktivado per renkontoj ĉe publikaj lokoj, reklamado per T-ĉemizoj, babili esperante en aŭtobusoj prelegoj ĉe lernejoj; kultura agado per la plinombrigo de periodaj renkontiĝoj, diversigo de la aktivecoj per la starigo de postleciona horaro por kulturaj prezentadoj kaj distrado.

ESPERANTO EN AMAZONIO

Laŭ informo de MOMENTON!/15 (BEJO-bulteno), "en Belém (PA), nova movadstilo: Klubo Esperantista Zamenhof (KEZ) diskonigas Esperanton ne plu per flugfolioj aŭ gazetaj reklamoj (pri kies neefikeco oni finfine ekkonscias...), sed per debatoj, ĉiun lastan dimanĉon de la monato". Novaj E-organizaĵoj fondiĝas tra Amazonio inter ili AEK - Acre Esperanto-Klubo (poŝtkesto 128, 69900-Rio Branco, AC), Amazonas Esperanto Asocio (poŝtkesto 1823, 69000-Manaus, AM), KEZ-Klubo Esperantista Zamenhof (poŝtkesto 2012, 66000-Belém, PA kaj Rondônia Esperanto Asocio, str. Antônio Cabral, 219, 69300-Boa Vista, RR.

KIEL DIRI ?

KIEL ONI POVAS DIRI ... EN ESPERANTO? = Como a gente pode dizer ... em Esperanto?

BONVOLU RIPETI, MI NE KOMPRENIS VIN... = Por favor, repita; não o compreendi.

PERMESU! = Com licença!

SENKULPIGU! = Desculpe interromper! (ao interromper-se uma conversa para falar-se com alguém)

PARDONU! = Perdão! (ao desculpar-se por não ter ouvido o que uma pessoa tenha falado).

KION VI OPINIAS/PENSAS PRI...? = O que você acha/pensa sobre...?

ĜI ESTAS TRE BONGUSTA! = Ele(ela) está muito gostoso(a)!

ĈU MI FARU TION? = Quer que eu faça isso?

KIOM KOSTAS? = Quanto custa?

KIE ESTAS LA NECESEJO? = Onde é o WC?

MI GRATULAS VIN PRO VIA PRELEGO! = Parabéns por sua palestra!

NE DANKINDE! = De nada!

KIE TROVIĜAS LA RESTORACIO/POŜT-OFICEJO? = Onde fica o restaurante/correio?

ĈU VI HAVAS ALIAN PLI (MAL)GRANDA? = Você tem algum(a) outro(a) maior/menor?

NE MALFRUIĜU! = Não se atrase!

LA SUKERUJON/SALUJON, MI PETAS. = O açucareiro/saleiro, por favor!

JES JA! = Sim, realmente! SENDUBE! = Sem dúvida!

SAMKIEL AL VI! = Igualmente! ĈU VERE? = Verdade?

MI VOLAS PREZENTI AL VI... = Quero lhe apresentar...

PLEZURON! = Muito prazer!

ERNANI BORGES, el PORTO ALEGRE